

Pri GUEBWILLER, Sro Wermelinger raportas, ke 12 lernantoj ~~liaj~~ nun finlernas la kurson. Ili organizos septembran renkontiĝon kaj eldonon de diapozitivoj.

Pri STRASBOURG, Sro Knecht mencias regulajn kunvenojn, akcepton de diverslandaj gesamideanoj, organizon de pikniko la 28/5 en la Hingrie, kaj kurson de Sro Zipfel al la poŝtistoj kun 15 lernantoj.

Pri Bruyères, Sro Claudel informas, ke el 25 pasintjaraj lernantoj, 10 restas en duagrada kurso. En elementa kurso restas 15-18 gelernantoj, el kiuj 8 veturis al Grésillon dum Pasko kaj pluraj venos en la Hingrie. El 15 liceaj profesoroj, kiuj eklernis Esperanton, restas 4 praktikantoj de nia lingvo.

En THANN (Sro Grossmann) regulaj kunvenoj okazas, oni ankaŭ ekprizorgas la septembran renkontiĝon. En NANCY ankaŭ, oni nun tre regule kunvenas, kvankam Sro COLNOT (post malsukcesaj provoj por restarigi oficialan grupon antaŭ pluraj jaroj) opinias ke gruprestarigo ankoraŭ nun ne estas ebla. En EPINAL, en BAR-le-DUC, restas izolulaj, sed neniu grupo, neniu kunveno. Fine en MULHOUSE, kie ne plu ekzistis grupo, post kontaktoj kun la popoluniversitato, Sro Cuené sukcesis starigi kurson kun 12-13 gelernantoj (el kiuj restas nun ankoraŭ 7).

Sro CHAPPELLIER prezentas la kasraporton, kiu estas ankaŭ unuanime akceptita. Sro Wermelinger demandas, ĉar la kaso estas prospera, kion ni faru per tiu mono? Fakte, la elspezoj por la funkciado de la Federacio estis dum la lastaj jaroj minimumaj: nur poŝtelspezoj por leteroj aŭ dissendo de la bulteno. Sed tre baldaŭ ni ne plu havos la samajn favorajn cirkonstancojn por eldoni la bultenon. Se ni devos pagi, krom la sendadon, ankaŭ la presadon kaj la paperon, nia kaso estos malpli bonfarta. Se ni regule sendos delegiton al la kunvenoj de la konsilio de U.F.E. kal al la Nacia Kongreso, la kaso ne povos rezisti longe.

La tasko de la komitato estos ĝuste, elekti la plej trafajn rimedojn por elspezi nian monon nur por la progresigo de Esperanto.

Nun, la kongreso reelektas trionon de la Federacia Komitato. Tri antaŭaj komitatanoj denove kandidatiĝas (Sroj COLNOT, CUENE, DURAND), kvara samideano akceptas kandidatiĝi: Sro WERMELINGER. La 4 kandidatoj estas unuanime elektitaj.

La kongreso poste studas la jarraportojn de U.F.E. Kelkaj aktivuloj starigas rimarkojn, kiuj estigas diskutojn kelkfoje sufiĉe longajn. Post Sro DURAND, la kongresanoj dezirus klarigojn pri la ekziĝo el U.F.E. de Profesoro Duc-Goninaz. Sro WERMELINGER miras, ke ĉar la aktiveca raporto ne mencias la agadon de Sro DELAIRE. La kaŭzo estas, ke U.F.E. raportas nur pri la aktiveca de la oficialaj grupoj, ne pri privata aktiveco de profesulo, kiu laboras tute ekstere de la oficiala Esperanto-movado. Ekzemple, JEFO skribis al li por peti nomojn kaj adresojn de junaj lernantoj, sed ne ricevis respondon.

Krom 2 sindetenoj, nia kongreso aprobas la raporton pri agado en 1966. Ni rimarkis la punkton 13an de tiu raporto kaj petas klarigojn pri la ekziĝo de membro tiel aktiva kiel Profesoro Duc-Goninaz.

La financa raporto ankaŭ vekas longajn diskutojn. La laborkunsidon ni devas ĉesigi iom post la 11a, ĉar la oficiala akcepto de la urbestro okazos en la urbdomo je la 11a30. Per diversaj aŭtomobiloj, la kongresanoj rapide atingas la urbodomon, kie la urbestro, Sro Emile MULLER kaj diversaj aŭtoritatuloj de MULHOUSE atendas nin. La urbestro akceptas nin per tre afabla parolado.

Sro Cuené dankas lin je la nomo de la esperantistoj, memorigante ke Sro MULLER estas unu el la 22 francaj urbestroj, kiuj subskribis peticion por la enkonduko de Esperanto en la publikajnlernejojn kaj li ankaŭ subskribis la lastan peticion al UNO. Per bone dokumentita parolado, li lerte mencias la diversajn atingojn de la Esperanto-movado kaj komparas ilin kun la kostoj de la traduklaboroj ĉe U.N.O.: elokventaj ciferoj, kiujn ni reproduktos aparte en nia bulteno.

Tiam alvenas nia samideano Garry Davis, la "unua mondĉivitano", kiu donas al la urbestro pasporton de mondĉivitano.

Per honorvino kaj kukoj, ĉarmaj alzacaninoj en festa kostumo poste regalias nin, kaj tiu akcepto tre ĝoje finiĝas.

La tagmanĝo en la restoracio de la Zoologia ĝardeno estas ankaŭ tre gaja. Tuj poste okazas elementa Esperanto-ekzameno sub gvidado de Sro Zipfel kaj Fraŭlino Dietz.

Dum parto de la kongresanoj vizitas la ĝardenon, laborkunveno denove kunigas 11 aktivulojn, kiuj deziras finpritrakti la restantajn problemojn de la tagordo. Konstante ke neniu el nia membraro povos partopreni la Nacian Kongreson en Calais, la Federacia Kongreso komisias la sekretarion enketi ĉe la aliaj Federacioj por trovi delegitojn. Ni unue kontaktos Sron Frangeul, respondeculon de la Centra-Okcidenta Federacio, kies delegito jam reprezentis nin la pasintan jaron en LE HAVRE (1).

Ni daŭrigas la diskutadon pri la nacia financa raporto kaj pri la aldonitaj projektoj de rezolucioj proponitaj de la kontrevizinto, kaj ni decidis sendi al la Nacia Kongreso la jenajn rezoluciojn :

a)- Studinte la finanĉan raporton, leginte la raporton de la kontrevizinto, ni aprobas la kontojn de la jarperiodo 1965-1966 kaj kvitigas la kasiston (rezolucio unuanime akceptita krom 1 sindeteno). Ni rimarkigas, ke la salajro de nia sindonema Oficeja Sekretariino estas maldece malalta.

b)- Destino de la jarprofito : ni deziras, ke la financa raporto aperu plej malfrue en la januara numero de la revuo, por ke la Federacioj havu pli da tempo por studi ĝin. Pro ne sufiĉaj informoj pri la "eldona fondaĵo", ni malaprobas la destinojn proponitaj por la jarprofito. Ni deziras, ke la sumoj donacitaj de la membroj por la "Fondaĵo Domo" kaj "konservado de la sidejo en Parizo" estu rezervitaj en speciala depono, kiu garantias ilian uzadon nur por la proponita celo.

c)- Pri la federaciaj kotizoj : ni malaprobas la principon de tiu 3a propono de Sro Royer. Ni bone scias, ke la Federacioj devas enkasigi la kotizojn kaj repagi al UFE-UEA ties parton. Nia federacia bulteno konstante alvokas niajn membrojn agi tiucele.

Ni instrukas la konsilantaron de UFE adkvate informi la membrojn pere de la revuo, ke ili devas pagi sian kotizon rekte al la Federacioj. Tia informado ŝajnis ĝis nun neglektita en la nacia revuo.

d)- Elekto de la konsilantoj de U.F.E. : Ni voĉdonis por :

- | | |
|--------------------------------------|------------------------------|
| 1/- A. BOURDEAUX (unuanime) | 5/- J. ROUSSEAU (unuanime) |
| 2/- J. MANCEAU (unuanime) | 6/- J. VINCENT (unuanime) |
| 3/- A. RIBOT (nur duono de la voĉoj) | 7/- F. DITACROUTE (unuanime) |
| 4/- G. ROUGETET (unuanime) | 8/- P. ROYER (unuanime). |

Pri la nombro de voĉoj, pri kiuj disponas nia delegito ĉe la Nacia Kongreso, ni rimarkis ke "Franca Esperantisto" n° 243 (paĝon 94an) indikas 92 membrojn en nia Federacio. Niaj listoj montras entute nur 84 membrojn por la jaro 1966 kaj 75 por 1967 (2).

Nia proksima Federacia Kongreso okazos en Strasbourg dum 1968.

Fine, 8 komitatanoj kunvenas por elekti la novan estraron. Por respondi al la deziro de Sro KUBLER, kiu ŝatus ne plu resti Prezidanto por povi pli efike labori por la Junulara Movado, en kiu oni donis al li novajn gravajn taskojn dum la nacia kunveno de JEFO en Grésillon, Sro Cuené akceptas kandidatiĝi kaj li estas unuanime elektita Prezidanto. Sroj Chapellier kaj Colnot, kiuj ne trovas anstataŭantojn, restas respektive kasisto kaj sekretario. Fino Jacquot, kiu afable proponas sian helpon, kaj cetere jam efike helpis en tia tasko, estas oficiale elektita helpsekretariino.

Ni memorigas, ke krom tiuj 4 personoj, kiuj konsistigas la estraron, la komitato konsistas nun el : Sro DURAND (Epinal) kaj WERMELINGER (Guebwiller) ĵus elektitaj por 3 jaroj, Sroj CLAUDEL (Bruyères) kaj HABERMEHL (Strasbourg) elektitaj la pasintan jaron, Sroj FONDRILLON (Nancy), HEINTZ (Strasbourg), KUBLER (Thann) kaj MANCEAU (Creutzwald), kies mandatoj finiĝos la proksiman jaron...

Estis jam preskaŭ la 17a horo kiam finiĝis la lastaj laboroj. Post rapida vizito al la Zoologia ĝardeno, ĉiuj disiris: ĝis revido....en la Hingrie, aŭ la proksiman jaron en Strasbourg !

- (1) Sro FRANGEUL transdonis nian leteron al nia Prezidinto, Sro BOYER, kiu denove estis nia delegito en Calais.
- (2) Post la kongreso alvenis novaj realiĝoj kaj nun ni havas 85 membrojn.

==*==*==*==*==*==*==*==*==*==*==*==*==*

ESPERANTO-EKZAMENO

Dum la Federacia Kongreso okazis ekzameno por la disdono de la diplomo "Atesto pri lernado".

Sukcesis tiun ekzamenon : Gesinjoroj DESMARIIS (Illzach) Sroj MULLER, CHOLLEY, Fino HABERER (Mulhouse) Gesinjoroj MARCK (Lautenbach), Sro STIRNEMANN (Vieux-Thann), Sro WERMELINGER (Buhl), Sro KOHLMANN (Thann), Fino WALZ (Strasbourg).

En Guebwiller la 10an de majo okazis alia ekzameno. Sukcesis ĝin : Sino WERMELINGER, Soeur Jeanne-Monique, Sro Pastro SCHREIBER Léonard, Finoj ERNY, MULLER, UNTERNEHR, BARON.

Al ĉiuj sukcesintoj, kaj al iliaj profesoroj, sincerajn gratulojn !

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

Naskiĝo :

Gesinjoroj DESMARIIS ne nur sukcesis la ekzamenon en Mulhouse, ili ankaŭ anoncas la naskiĝon de ĉarma filineto, Nadia. Gratulojn al la feliĉaj gepatroj kaj bondeziroj al la nova denaska esperantistino !

KELKAJ CIFEROJ PRI LA ELSPEZOJ DE U.N.O. por TRADUKLABOROJ (cititaj de Sre Cuené en Mulhouse)

Por simpla komisiono-kunveno : 1765 dolaroj (8825 frankoj) por samtempa tradukado en 4 lingvojn, protokoloj kaj kunligitaj elspezoj. 3000 ĝis 4500 tiaj kunvenoj okazas ĉiujare. Kalkulu mem la sumon !

Iu ajn raporto aŭ dokumento kun ĉirkaŭ 200 paĝoj kostas 15 000 dol. (75000 Fr, do 7 500 000 malnovaj frankoj) se oni tradukas ĝin en la 4 laborlingvojn.

La Internacia Konferenco pri "Internaciaj Kontraktoj" kiu okazis samtempe en Novjorko kaj Genevo kostis 295 139 dol. t.e. 1475 695 frankoj (147 569 500 malnovaj frankoj). Tiu ciferoj entenas :

- por la interpretistoj : 157 565 dol.
- por la preparado de la dokumentoj : 14 000 dol.
- la tradukoj de la laboroj de la 2 komitatoj : 60 150 dol.
- la tradukoj de la laboroj de la plenumaj kunsidoj : 63 424 dol.

Kiam do ĉiuj internaciaj instancoj decidiĝos oficialigi Esperanton !

EKSKURSOJ KAJ RENKONTIGOJ :

Projektoj : Sro KUBLER planas dutagan restadon (tendumado) ie en la montaro Vogejoj, la 19-20 ajn de aŭgusto. Ni ankoraŭ ne scias kie !

La Nancianoj antaŭvidas ekskurson ĉirkaŭ la 17a aŭ 24a de septembro, eble en LA BRESSE. Interesiĝantoj anoncu sin por ricevi pliajn informojn !

RAPORTOJ pri OKAZINTAĴOJ :

Sukcesa renkontiĝo en la Hingrie.

La 27an kaj 28 an de majo, Esperanto-Strasbourg organizis renkontiĝon en la "Maison de Vacances de l'Union des Femmes Françaises" en La Hingrie apud Rombach-le-Franc. Partoprenis 35 gejunuloj kaj eksgejunuloj el Guebwiller, Bruyères, Strasbourg, Nancy, Thann, Mulhouse kaj hungarino, kiu trapasas studentajn feriojn en Francio.

Sabaton, antaŭ la vespermanĝo, S-ano Zipfel vizitigis al ni la domegon, kaj ni interkonatiĝis. Poste okazis distra vespero : oni projekciis poŝtkartojn de 1935 pri la grupo de Strasbourg, filmojn de la lastjara U.E.A.-kongreso, diapozitivojn pri Budapesto kun komentarioj faritaj de nia hungara samideano. Ni kantis ankoraŭ kaj ludis ĝis la unua horo.

Dimanĉon matene, kelkaj partoprenantoj vizitis la kastelon "Haut-Koenigsbourg" ; pluraj el ni promenis en la arbaraj ĉirkaŭaĵoj ; la aliaj restis ĉe la domo por ludi ĉu per pilkoj, ĉu per pilketoj.

Post la tagmanĝo, oni multe fotis nin. Ni diskutis kaj amuziĝis ankoraŭ, ĝis nia ŝoforo vokis nin por foriri. Tamen nur estis "ĝis revido" ĉar ni jam atendas venontajn renkontiĝojn por denove trapasi agrablajn horojn en Esperantujo.

KOHLMANN Gérard
Esperanto-Grupo THANN.

---:---:---:---:---

Junulara renkontiĝo en THANN

Dimanĉon 11-an de junio okazis junulara renkontiĝo apud Thann, en la montaro. Ĝin partoprenis 9 gejunuloj el Bruyères, Guebwiller, Mulhouse kaj Thann. 3 aliaj el Thann intencis veni pli malfrue, sed retrovis nin en la montaro nur ĉe la hejmeveno.

La vetero ne estis tre bela, pro tio duonhora marŝado ĝis la monto "Hundsrück" varmigis kaj niajn korojn kaj niajn korpojn.

Pro manko da kuraĝo, ni ne sukcesis atingi la supraĵon de la monto, kaj haltis en ĉarma loko, kie atendis nin ligna benko kaj granda herbejo.

Nekuraĝuloj sed tamen sportemuloj, ni amuziĝis, ĉu manĝante kaj trinkante (!), ĉu babilante, ĉu ludante. Je piedpilko ni fakte ludis dum du aŭ tri horoj, kon ŝajne ĉiuj ŝatis.

La venonta renkontiĝo okazos denove ie en la montaro, kie ni restados du tagojn, en aŭgusto.

unu el la partoprenintoj.

---:---:---:---:---

Ekskurso al HAUT-BARR

Je la antaŭ-lastata dimanĉo de junio, dek-kvino da gesamideanoj rendevuis antaŭ la kastel-ruinaĵo Haut-Barr super Saverne. Ili venis el Nancy, Strasbourg, Thann, k.t.p... Ĉe la rendevuo estis ankaŭ bona amiko, nome la bela vetero. Unue ni surgrimpis la ruinaĵon mem ; de ĝia supro oni vidis belan panoramon. Sed la celo de tiu-ĉi rendevuo estis pieda ekskurso al kelkaj vidindaĵoj de la ĉirkaŭaĵo de Haut-Barr. Post malrapida ekmarŝado, aŭ pli bone, ekpromenado, ni atingis la ruinaĵojn de la du Geroldseck, unu nomata granda kaj la alia malgranda. Ambaŭfoje ni haltis iomete. Tiam ĉiu laŭ sia emo okupiĝis : la plej vizitemaj vizitis, la plej fotemaj fotis... kaj mi ĉe diru, ke la plej manĝemaj manĝadis. Eĉ kelkaj tiel malsatis ke ili ne povis daŭrigi la promenadon (antaŭ ol manĝi, kompreneble!), kiu kondukis nin ĝis la roko Brotschberg. Sub tiu roko troviĝas grandega grotto. Jam la tondro aŭdiĝis kaj, ne pro timo sed pro saĝeco, ni preferis tagmanĝi apud tiu-ĉi grotto, kiu estus estinta bona rifuĝejo okaze de pluvo.

Sed kun ĝojo ni elektis lokon por manĝi kaj eltiris niajn proviantojn el sakoj. Post la manĝo ni eĉ provis kanti sed ŝajne ne kun tro da sukceso, eble pro tro planigitaj stomakoj ! Je la reirado ni ankau vizitis turon starigitan de isama Vogesa klubo. Gian surgrimpadon ebligis 87 ŝtupoj.

Post reveno al Haut-Barr, ni diskutis pri aliaj estontaj renkontiĝoj. Sed baldaŭ ni forlasis kaj adiaŭis nin.

A. GROSSMANN.

-*:~::~*:~::~*:~::~*:~::~*:~::~*:~::~*:~::~*:~::~*-

VORTO DE LA PREZIDANTO

Nia sekretario, Sre COLNOT, demandis min verki artikoleton por la Informilo, ĉar -diris li- estas la kutimo ke la prezidanto donu siajn ideojn pri la agado de la Federacio.

Kvankam mi ne konsideras min kiel fakta prezidanto, sed nur kiel "noma" (mi akceptis la titolon nur por ne perdi nian sekretarion kiu estas nia vera gvidanto, kaj multe pli ol mi meritis la prezidantecon) mi volonte obeas al li. Ne por proponi iun ajn novan revolucionan metodon en la gvidado de la organizo, ne por apelacii al niaj membroj demandante de ili pli viglan aktivecon : ni estas ĉiuj tiel malproksimaj unuj de la aliaj ke tia alvoko ne multe helpus.

Mi deziras nur, en la nomo de ĉiuj, esprimi nian dankon al Sinjoro COLNOT.

De longe mi konscias ke dank' al li, kaj nur al li, la Orient-Franca Federacio de Esperanto daŭrigas sian estadon. De longaj jaroj jam li plenumas sian sekretarian taskon: li laboras kun ĉiama bona humoro, li organizas, ĉeestas, aŭskultas, respondas, raportas, redaktas la Informilon, dissendas ĝin, okupiĝas pri restarigo de grupo en Nancy, li neniam altrudas sian personan opinion al ni, neniam plendas k.t.p. Ni multe ŝuldas al li kaj mi pensis ke tion devis esti dirita.

Koran dankon do al vi J.P. COLNOT. Nia afero estas en sekureco en viaj manoj.

M. CUENE

oooooooooooooooooooo
oooooooooooooooooooo

Nia vivo en BRUYERES

Proksimume 16 liceanoj trapasis la unuagradan ekzamenon, kaj 6 sukcesis. Tri el la profesoroj kiuj lernis Esperanton iris ĝis la fino de la kurso kaj sukcesis ĉe la ekzameno.

Dum la Paskaj ferioj, ni estis 8 en Grésillon.

Duagrada kurso okazas regule kun proksimume 10 partoprenantoj. Meze de junio ni organizos duagradan ekzamenon, kun ses kandidatoj.

Komence de majo, ni faris tombolon, kies profito utilos ĉefe al tiuj, kiuj veturos al Grésillon la proksiman jaron.

J.L. CLAUDEL.

Someraj Esperanto-kursoj en "Moulins des Apprentis"

La historio de la asocio "Moulins des Apprentis" komenciĝis, kiam kelkaj amikoj aĉetis en PIOT ruiniĝintan akvomuelejon en la valo de l'rivero "Creuse". Metilernantoj pasigis tie siajn feriojn, rekonstruante la muelejon kal konstruante novajn ejojn. Baldaŭ estis tro da volontuloj kaj la asocio aĉetis aliajn ruiniĝintajn muelejojn por rekonstrui ilin. Ĉiujare nun, miloj da volontuloj, de ĉiuj nacioj, religioj, lingvoj, aĝoj, emoj, aldoniĝis al tiu "rondo de amikeco" inter la popoloj. La laboro plektis ligojn, kie antaŭe estis retenemo kaj indiferento. Junaj hispanoj konstruis kun junaj jugoslavoĵ la pavilonon de Jugoslavio per feliĉe trovita konstrumaterialo : telegrafpalisoj superfluaĵ. La pavilono de Esperanto, kiu gardas la alirvojon al la Muelejo de PIOT, estas sammaniere konstruita. Nuntempe jam ekzistas 18 muelejoj en Francio, Jugoslavio, Germanio, Kameruno, Maroko.

M.D.A kaj ESPERANTO :

Jam de longe la asocio agnoskis la praktikan valoron de Esperanto, kiel kontaklingvo por la miloj de diversnaciaj volontuloj. Foje eĉ okazis kursoj, broŝuroj en Esperanto estas aĉeteblaj ĉe la Muelejo en PIOT, la revuo de la asocio regule publikigas artikolojn en kaj pri Esperanto.

En 1966, TEJO organizis sian unuan eksperimentan intensan kurson en Malval. En 1967 kursoj okazos denove en PIOT kaj eble en aliaj muelejoj dum kiel eble plej multaj semajnoj. Tio dependas de la nombro de esperantistoj, kiuj partoprenante la vivon de la muelejoj kiel la aliaj volontuloj, laboros parte kiel instruantoj de Esperanto. Dum kelkaj horoj tage, ili instruos per laŭeble efikaj metodoj, kantigos, ludos, kaj tiel klopodos atingi ke fine de dusemajna periodo la lernantoj jam baze interkompreniĝas per Esperanto. Por ĉiu dusemajna kurso oni bezonas instruanton, amuzanton (gitarludanto aŭ simila) kaj helpanton, do triopan ekipon. La restado ne estas senpaga, ĝi kostas 8-10 Fr tage.

Pliajn informojn, pri planitaj kursoj dum 1967, kaj eĉ por 1968, povos doni al vi Sro Hans BAKKER, Kastelenstr.231 - AMSTERDAM 2 - Nederlando.

Eĉ se por ĉi tiu jaro via libertempo jam estas planita, tuj anoncu vin por kunhelpo dum 1968 !

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

LA SERENADO

Foje mi vidis belan knabinon. Tiu knabino plaĉis al mi. Ŝi havis belajn kruojn, belan vizaĝon, belajn dentojn, belan... mi ne scias. Mi pensis : "Jen estas ĉarmulineto", kaj mi sekvis ŝin. Ŝi eniris riĉan domon.

- "Mi devas fari serenadon sub la fenestro de tiu belulino ; sed mi devas ankaŭ preni muzikinstrumenton".

Mi revenis en mian ĉambron, prenis tion, kio estas necesa, kaj iris sub la fenestron de la belulino.

Mi ludis : "La Neĝoj de l'Kilimanĝaro", atendante ŝian alvenon. Subite ŝi aperis. Ĉu vi scias tion, kion ŝi diris al mi ? Jenon :

- "Mi dankas vin, sed ankaŭ mi havas transistoraparaton ! Gardu la vian por vi" !

Claude Nichel - Bruyères.

--*-*-*-*-*-*-*-*-*-*

DEZIRAS KORESPONDI :

- Sino JOOS Edith
BRASOV. Bul.Lenin n° 1 - apart. 3 (Rumanio)
deziras korespondi por plibonigi sian scion pri Esperanto kaj por ekkoni fremdajn homojn kaj la kutimojn de aliaj landoj.

- Sre BOGDAN LUSINSKI -
BABIMOST (Pollando)
us. 28 Stycznia 5/3
woj. Zielonogorskie - pow. SULECHOV

18-jara fraŭlo, deziras interŝanĝi bildkartojn kaj poŝtmarkojn.

NI PERFEKTIGU NIAN LINGVOSCION !

Por plibonigi nian scipovon de Esperanto, estas konsilinde, ke ni legu, kiel eble plej ofte, bonajn artikolojn de spertaj redaktistoj kaj bonajn librojn de renomaj verkistoj. Dirante "bonajn", mi volas diri : bonajn ne nur laŭ la vidpunkto de la enhavo, sed ankaŭ - eĉ precipe - laŭ la vidpunkto de la gramatiko kaj de la stilo.

Rilate al la Esperanto-stilo kaj al ties plibonigo en sistema kaj rapida maniero, mi varme rekomendas al ĉiuj lingve perfektigemaj Esperanto-uzantoj (precipe al okazaj redaktantoj de gazet-artikoloj) la ĵus aperintan, vere modelan libron : "Ne tiel, sed tiel ĉi!" (Praktikaj konsiloj por akiri bonan Esperanto-stilon), verkita de F. Faulhaber, akademiano, kaj eldonita ĉe Dansk Esperanto-Forlag en Aabyhøj (Danlando). Favoraj recenzoj aperis jam en pluraj gazetoj.

Mi atentigas la legantojn ankaŭ pri la fakto, ke ofte -eĉ tro ofte!- kelkaj verkantoj de Esperanto-artikoloj neglektas la plej elementajn regulojn pri la interpunkcio. Oni povas opinii, ke ne estas gravege, se iufoje mankas komo, aŭ punkto, aŭ strekoj, aŭ krampoj, aŭ alia interpunkcia signo. Tamen, estas nepra fakto, ke korekta interpunkcio multe faciligas la legadon -do, sekve, ankaŭ la komprenon - tiom al novaj uzantoj de la internacia lingvo, kom al malnovaj.

Sed, krome, povas okazi, ke, pro manko de interpunkciaj signoj, la senco de frazo estas nekomprenebla aŭ erariga. Jen tipa ekzemplo : "La knabo petis panon manĝante pecon da ĉokolado". Ĉar tute mankas interpunkcio en tiu frazo, oni inklinas kompreni : "La knabo petis panon, manĝante pecon da ĉokolado". Metante du komojn, la senco de la frazo estas tute alia : "La knabo petis, panon manĝante, pecon da ĉokolado". Tiurilate, sen aldoni pluajn komentojn, ŝajnas al mi utile, atentigi pri la detale klarigitaj reguloj koncerne la interpunkcion, troveblaj en "Plena Gramatiko de Esperanto" verkita de Kalocsay kaj Waringhien (§ 403 ĝis 413 en la eldono de 1931, nova eldono aperis antaŭ nelonge).

A. LIENHARDT.

--o-o-o-o-o-o-o-o-o-o--

Stranga malsano

Li : Mi suferas de stranga malsano Mi manĝas kiel struto, mi trinkas kiel fiŝo, mi dormas kiel dormomuso kaj tamen mi sentas min lacigita kiel hundo ... Mi devas iri al kuracisto.

Ŝi : Kuracisto ne helpos... iru al veterinaro !

Rekompenco

"Paĉjo diras, ke estis muŝo en la kuko, kiun li aĉetis ĉi tie hieraŭ !"

"Diru al li, ke li resendu la muŝon, kaj mi donos al li sekvinberon anstataŭe".

Bona ideo

Patro : Vi aĉetis por la knabo tamburon ! Li ja certe malhelpos min, kiam mi laboras !

Patrino : Jes, vere....., do li ludos per ĝi nur post la tagmanĝo, kiam vi siestas.

--:--:--:--:--:--